Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, APRILO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

El medicina ĵurnalo: "La malsanulo postlasis siajn blankajn sangoĉelojn en alia malsanulejo!"

Ĉu vi aŭskultas la elsendojn de la Melburna Radio 3zzz?

Se vi uzas komputilon, sufiĉas iri al 3zzz.com, klaki al Programo kaj elekti Esperanton. Se vi klakos al www.melburno.org.au, vi ricevos la arĥivon de la Esperanto-elsendoj. Ekz. La 23an de februaro 2009 aŭdeblis ankaŭ nia samklubano Trevor. Li rakontis pri sia aventuro en Arnhemlando, titolita Krokodila timo. Ŝajne tute hazarde la saman elsendon eniris ankaŭ alia verko de Trevor: artikolo Kara Sinjoro Obama. Ĝi estis publikigita en la revuo La Gazeto. La redaktorino de la radioprogramo legis al la aŭskultantoj partojn de ĝi.

K. Steele

El medicina ĵurnalo: "Ĉar li devenas el Kopenhago, li ne havas infanojn!"

Esperanto instruata en Sudaŭstralio

Jes, ĝi instruatas. En nia propra urbo Adelajdo. Al trideko da 10-jaraj infanoj kadre de la regula elementlerneja edukado. Ĉu vi divenis kie? Tiuj, kiuj partoprenis la Vintran Kursaron en 2006 en la lernejo Hackham South certe memoras la tiean instruiston Gordon Coleman, kiu tiutempe gastigis nian aranĝon. Tiu sama Gordon ankaŭ ĉijare ekis sian jam

tradician Esperanto-instruadon al klaso da infanoj en la sudo de Adelajdo. Liaj lecionoj okazas merkrede kaj ĵaŭde posttagmeze. La 19an de februaro Sandor, Trevor kaj Katja ĉeestis parton de unu tia leciono kaj poste priparolis kun Gordon la eblajn strategiojn por eki la Esperanto-instruadon en pliaj lernejoj de Adelajdo.

K. Steele

Panjo adiaŭas sian amikinon, kiu estas juna kaj bela. Apud Panjo staras ŝia fileto. "Nu, kisu mian amikinon", diras Panjo. "Ne," respondas la filo.

"Sed kial vi ne volas kisi mian amikinon?" demandas Panjo.

"Ĉar estas tro riske kisi ŝin", respondas la filo.

"Kiel povas esti riske, vi riskas ofendi ŝin, se vi ne kisos ŝin".

"Sed hieraŭ Paĉjo provis kisi ŝin, kaj ŝi vangofrapegis lin!"

Kontribuita de Nicole

Vizitis Adelajdon la esperantista vegetaranestro

Lundon la 9an de marto la adelajdaj esperantistoj havis la ĝojon kaj honoron pasigi tutan posttagmezon kune kun la prezidanto de Tutmonda Esperanto Vegetarana Asocio.

Kristoforo Fettes, la prezidanto, estis gastigata de Katja kaj Trevor, kiuj veturigis lin al la belega hejmo de Indrani, kie ni ĉiuj ĝuis la kunestadon kun Kristoforo, kiu parolis al ni pri sia vivo, esperantistiĝo kaj vegetaraniĝo. Ni ĉiuj tre ĝojis. Fakte estas vera ĝojo, kiam venas viziti nin tiom bonaj kaj sciantaj homoj, la kremo de la Esperanto-movado.

El medicina ĵurnalo: "Ni rakontos al la patrino, ke ni vakcinos ŝin, tuj kiam ŝi pezos 4 kilogramojn !"

Troviĝas tre konvena retadreso uzenda!

Neesperantistoj ĉiam diras, preskaŭ ĝisnaŭze, ke oni neniam vidas esperantistojn kaj neniam aŭdas aŭ legas ion ajn pri Esperanto.

Nu eble ili pravas. Ni esperantistoj verŝajne povus fari multon pli ol ni jam faras, ĉu ne? La vero verŝajne estas, ke la neesperantistoj neniam pensas pri Esperanto, ĉar ili eĉ ne interesiĝas pri ĝi. Mi ankoraŭ memoras, ke en 1997 okazis la Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo. Ekde la komenciĝo de King William's Street kaj ĝis ĝia finiĝo ĉe Victoria Square estis miloj da Esperanto-flagoj reklamantaj la kongreson. Sed kiam oni du aŭ tri semajnojn post la finiĝo de la kongreso parolis kun ordinaruloj, kiuj ĉiutage loĝas kaj laboras en Adelajdo, ili ĉiam diris, ke ili neniam vidas kaj aŭdas ion ajn pri Esperanto. Ili laŭiris King William Street almenaŭ du fojojn ĉiutage, sed evidente kun fermitaj okuloj ! Do ne nur ni, sed ankaŭ ili, devas vekiĝi kaj aktivi !

Nu, tre multaj el ni estas ankoraŭ sufiĉe junaj kaj tre ŝatas aspekti tiaj. Ni povus nin vesti per belegaj T-ĉemizoj reklamantaj nian universalan lingvon. Ni povus dekori niajn aŭtojn per gluafiŝoj reklamantaj Esperanton. Kaj kiam ni festas, ni povas doni al niaj neesperantistaj kiel kompreneble ankaŭ al niaj esperantistaj gastoj bongustegajn marcipan-tavoletojn kun la portreto de Zamenhof. Troviĝas multaj aliaj ebloj. Sed se vi vere kaj serioze interesiĝas pri la reklamo de Esperanto, mi rekomendas al vi eniri la hejmpaĝon de Peter Weide, unu el niaj plej entuziasmaj samideanoj, kies retadreso estas la jena: http://esperantoĉemizo.saluton.dk

Ni ne celas atentigon pri komerca entrepreno, sed pri klopodo helpi disvastigi ĉe la ĝenerala publiko la rekonon, ke Esperanto ekzistas kaj vivas.

"Kiom da ŝafoj vi havas" demandis raportisto la paŝtiston.

"5213!"

"Ho, tio estas terure multaj! Vi nepre havas propran, specialan artifikon por nombri ilin, ĉu ne?"

"Jes kompreneble. Mi nombras la krurojn kaj dividas ilin per kvar!"

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 1an de aprilo ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo i.a. por okazigi la ĉiujaran jarkunvenon.
Ankoraŭ ne estas decidite kiam ni ekskursetos al Carrrick Hill, 46 Carrick Hill Drive, Springfield, S.A. 5062, nek kiun vesperon ni teatrumos ĉe Pat, nek kiam ni vizitos la mangloarbaron en Sankta Kildo.
La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.
La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare en oktobro.
La AEA-kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de novembro en Kanbero.
La Novzelanda Kongreso okazos ver$ajne de la 3a ĝis la 9a de januaro 2010.
La AEA-Somerkursaro okazos en januaro 2010 en Sidnejo.
En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

El medicina ĵurnalo: "La malsanulo plendas pri tio, ke li vidas ĉion duoble. Tio okazas dum lia tuta enmalsanulejiĝo. Laŭ mia opinio ni devas rentgenfotografi liajn maleolojn!"

Protokolo pri la kunsido de ILEI – Aŭstralio

ILEI okazigis sian jarkunvenon en Sidnejo la 16an de januaro 2009.

1. **La ĉeestantojn bonvenigis Jennifer Bishop. Ĉiu ricevis skribitan programon.**
2. **2. Atilio Rojas, la sekretario de ILEI, agnoskis la 11-jaran laboron de la Aŭstralia ILEI-sekcio, precipe la "Ekparoli"-programon kaj la aktualan programon de Penny Vos. Li sugestis imiti la eŭropan programon "Flugiloj de malfacila vento" por trejni junajn Esperanto-instruontojn kaj informis pri la revuo IPR. Jenny Bishop laboris kiel reprezentanto de ILEI dum jaroj, poste transprenis la taskon Penny Vos, kiu nun okupiĝas pri la granda programo por la bazaj lernejoj**

de Aŭstralio. Jenny reakceptas sian iaman rolon, kiu bone kongruas kun ŝia rolo kiel direktoro pri edukado en la estraro de AEA.

La nur reta abono de IPR kostas en Aŭstralio $ 7,60. La papera revuo $ 32,60 (la petanto povas samtempe senpage ricevi ankaŭ la retan IPR).

3. **En 2007 okazis en la 7 plej grandaj universitatoj de Aŭstralio kunsido pri la krizo en la lingva edukado en la lando. Oni konkludis, ke la krizo estas profunda kaj la kutimaj rimedoj ne helpas. La ĝenerala publiko estis petita doni ideojn pri la solvo. Penny Vos preparis kompleksan materialon prezentitan en belforma publikaĵo, kiu proponas instruadon de Esperanto en la bazaj lernejoj per rimedoj, kiujn iu ajn instruisto povus rapide alproprigi kaj utiligi. Ŝia solvo estas nacia sistemo, kiu akordas kun la nun ekzistanta nacia studprogramo. La reformo de la instruado de fremdaj lingvoj en Aŭstralio okazos post 2 jaroj, ĝis tiam Penny finos ankaŭ la preparon de lernolibroj kaj instruhelpiloj.**

   Jenny Bishop helpas pri listo de gravuloj, al kiuj la libro de Penny estu sendota. AEA zorgos pri la propagando.

Penny Vos: la libro celas la lernejestrojn de bazaj lernejoj ĝis la respondecaj ministroj. Estas granda tasko prepari po 1 instruiston en kunlaborontaj lernejoj, fini po 2 librojn por instruistoj, 1 libron kun ĝeneralaj konsiloj, lernolibrojn, afiŝojn, helpilojn...

Katja Steele demandis, ĉu AEA havas strategion pri la informado pri la projekto de Penny Vos?

Jenny Bishop: jam pretas grandaj afiŝoj, kiuj estos distribuitaj al bibliotekoj, komunumaj domoj, universitatoj ktp. tra la tuta lando.

4. **Sandor Horvath petis, ke tiuj, kiuj instruas eĉ se nur 1 aŭ 2 lernantojn, informu pri tio almenaŭ rete.**

   Penny Vos dissendos invitmesaĝon por aliĝi al la reta ILEI-diskutlisto, kiu povus esti nia taŭga ligilo.

5. **Siatempe ILEI havis labor-rilatojn kun UNESKO. Por rehavi ilin, oni devas proponi projekton. Ĉar la ILEI-konferenco en 2008 estis planita por Afriko, pri kiu UNESKO aparte zorgas, Jean-Pierre Boulet proponis prepari libreton por afrikanoj, verkitan de afrikanoj. La libreto jam prespretas – Monique Arnaud montris la materialon al la ĉeestantoj.**
6. **Tiuj, kiuj en la lasta jaro instruis Esperanton, sendu siajn raportojn al Penny Vos, kiu kompilos el ili artikoleton por IPR.**
7. **Penny Vos esperas instrui Esperanton en la loka lernejo.**

   Tasko por ĉiu estas helpi realigi la projekton de Penny. Necesas informi pri ĝi dum konferencoj, trovi la unuajn kunlaborontajn lernejojn, promocii la libron pri la instruado de Esperanto. Penny pretas vojaĝi al la lokoj, kie ŝi ricevos la eblon prezenti sian projekton.

   Dianne Lukes – jam vizitis 10 -12 lernejojn serĉante kunlaboron.
8. **Kyung-mi Cho parolis al kelkaj el la junaj koreaj instruistoj, kiuj partoprenis trejnadon pri la angla en Sidnejo kaj loĝis-manĝis samloke kiel ni. Ili vizitos ŝin post 3 tagoj por paroli pri Esperanto, kies ebloj ege impresis ilin.**

   Atilio Rojas: ILEI serĉas lokon por siaj ontaj kongresoj. Li sugestis inviti la Esperanto-instruistaron al Aŭstralio.

   La kunsidon fermis Jenny Bishop.

K. Steele

El medicina ĵurnalo: "La malsanulo pluvivis la pasintajn 24 horojn tute sen oksigeno!"

Kaj jen iom da interreta folkloro, sendita de Luiza Carol:

La tablotuko

aŭ kiu diras, ke Dio ne agas mistere?

La tute nova pastro kaj lia edzino, ĵus taskitaj al sia unua ministrejo por malfermi preĝejon en antaŭurbo de

Brooklyn, alvenis komence de oktobro ekscititaj pro siaj ebloj. Ekvidante sian preĝejon ili preskaŭ perdis la kuraĝon. La preĝejo estis kaduka kaj multe da laborego necesis. Ili decidis fini ĉion antaŭ la unua Diservo Kristnaskan antaŭvesperon.

Ili laboregadis riparante la benkojn, kaj ĉion farbante. La 18an de decembro preskaŭ ĉio estis en bona ordo. La 19an de decembro venis terura tempesto kun pluvego, kiu daŭris du tagojn. La 21an de decembro la pastro iris por inspekti la preĝejon. Li preskaŭ ploris vidante ke la tegmento estis enlasinta akvon, kiu kaŭzis ke granda areo da gipso, proksimume 6 oble 3 metrojn, estis falinta el la antaŭa muro de la sanktejo ĝuste malantaŭ la predikejo.

La pastro forpurigis la malpuraĵon de sur la planko, kaj nesciante kion fari krom prokrasti la Kristnaskan antaŭvesperan Diservon, li iris hejmen.

Survoje hejmen li rimarkis, ke loka firmao aranĝis bazaron karitatan. Li decidis eniri. Unu el la vendotaĵoj estis belega permane farita, eburkolora, kroĉetita tablotuko kun tre belegaj artaĵoj, belegaj koloroj kaj brodita kruco ĝuste en la centro. Ĝi havis la ĝustan grandecon por kovri la truon en la antaŭa muro. Li aĉetis la tablotukon kaj rapidis al la preĝejo.

Sed nun komencis neĝi. Maljuna sinjorino kuris por trafi la buson, sed ŝi maltrafis ĝin. La pastro invitis ŝin atendi en la varma preĝejo, ĝis alia buso venos post 45 minutoj. Ŝi sidigis sin sur unu el la benkoj. Ŝi ne rigardis la pastron, kiu alportis ŝtupetaron ktp. Li pendigis la tablotukon kvazaŭ ĝi estus murtapiŝo. La pastro apenaŭ povis kredi siaj okulojn. Tiom belege ĝi aspektis tie pendanta kaj kovranta la tutan problemareon.

Li tiam rimarkis, ke la virino laŭiris la centran navon. Ŝia vizaĝo estis blanka kiel litotuko. ”Pastro,” ŝi demandis, de kie vi havas tiun tablotukon?”

La pastro klarigis al ŝi. La virino lin petis kontroli la suban dekstran angulon por vidi ĉu la tablotuko estas kroĉite subskribita per la literoj EBG. Jes, montriĝis ke jes. Tiuj tri literoj estis la inicialoj de la virino, kiu kroĉis tiun

tablotukon antaŭ 35 jaroj, kiam ŝi ankoraŭ loĝis en Aŭstrujo.

Ŝi povis apenaŭ kredi tion, kiam la pastro rakontis al ŝi, ke li ĵus aĉetis la tablotukon. Ŝi rakontis al li, ke antaŭ la milito ŝi kaj ŝia edzo estis riĉuloj en Aŭstrujo. Kiam venis la nazioj, ŝi estis devigata foriri. Ŝia edzo devis ŝin sekvi la sekvan semajnon. Li estis kaptita, enkarcerigita kaj ili depost tiam neniam revidis unu la alian.

La pastro deziris doni al ŝi la tablotukon; sed ŝi insistis ke ĝi restu posedaĵo de la preĝejo. La pastro insistis ke li veturigu ŝin hejmen. Ŝi loĝis trans Staten Island. Ŝi estis en Brooklyn nur unu tagon, purigante la domon de iu konato.

Kian belegan Diservon ili havis Kristnaskan Vesperon. La preĝejo estis preskaŭ plenplena. La muziko kaj etoso estis rimarkindaj. Fine de la Diservo la pastro kaj lia edzino salutis ĉiun ĉe la enirejo, kaj multaj promesis reveni. Iu maljuna viro, kiun la pastro rekonis, restis sidanta sur iu benko rigardadante. La pastro scivolis, kial li ne eliras. La viro lin demandis, de kie li havas la tablotukon pendanta sur la antaŭmuro, ĉar ĝi estas identa al iu, kiun lia edzino faris antaŭ multaj jaroj, kiam ili, antaŭ la milito, loĝis en Aŭstrujo. Li ne komprenis kiel du tablotukoj povas esti tiom similaj unu al la alia. Li rakontis al la pastro, ke la nazioj venis, devigis lian edzinon forkuri kaj kiel li promesis sekvi ŝin, sed li estis arestita kaj enkarcerigita. Ekde tiam li neniam revidis sian edzinon kaj hejmon tiujn pasintajn 35 jarojn.

La pastro petis lin, ĉu li rajtas veturigi lin iomete. Ili veturis al Staten Island. Ili veturis al la sama domo kien la pastro veturigis la virinon antaŭ tri tagoj. Li helpis al la viro supren iri la tri etaĝojn al la luloĝejo de la virino. Li frapis la pordon kaj tiam li vidis la plej bonegan Kristnaskan rekuniĝon imageblan.

Vera rakonto de Pastro Rob Reid

El medicina ĵurnalo: "La malsanulo suferas pro deprimiteco ek de 1989, kiam li komencis reguli konsulti min!"